

Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

3) *Cantami, o Diva!/Kantu, diino!*

Alia ĝenerala problemo en Esperanto ŝajnas al mi la poemoj kaj la poemistoj (verkantoj de poemoj, kiuj en sia lingvo nomas sin "poetoj"). Kio estas poem-arto? Mi ne scias, ĉar mi estas simpla tradukanto, sed mi kredas ke mi povas rekoni veran poemon de rimaĵo [Ĉu vi memoras: Qui comincia l'avventura/del Signor Bonaventura/ricco ormai da far paura...?].

Aŭskultu ĉi tion:

Ad alcuni piace la poesia

W. Szymborska – traduko al la itala de P. Marchesani.

Ad alcuni –

cioè non a tutti.

E neppure alla maggiornaza, ma alla minoranza.

Senza contare le scuole, dove è un obbligo,

e i poeti stessi,

ce ne saranno forse due su mille.

Piace –

Ma piace anche la pasta in brodo,

piacciono i complimenti e il colore azzurro,

piace una vecchia sciarpa,

piace averla vinta,

piace accarezzare un cane.

La poesia –

ma cos'è mai la poesia?

Più d'una risposta incerta

è stata già data in proposito.

Ma io non lo so, non lo so e mi aggrappo a questo.

Come alla salvezza di un corrimano.

Ĉi tiu poemo estas de Wyslawa Szymborska [Wislava Ŝimborska], unu el la ĉefaj poem-verkistoj en Pollando en la lasta duono de la pasinta jarcento. Ĝi estis tradukita al la itala de Pietro Marchesani [Pjetro Markezani], profesoro pri pola lingvo kaj literaturo en la universitato de Ĝenovo. Ĉu vi trovas en ĝi vorton, kiun vi ne komprenas? Tia estas la moderna poem-arto en multaj landoj kaj lingvoj. Se en la angla en poemo vi uzus vorton, kiun la normala homo ne komprenas, oni taksus vin strangulo. Aliflanke legu ĉi tion:

*Lui folgorante in solio
vide il mio genio e tacque;
quando, con vece assidua,
cadde, risorse e giacque,
di mille voci al sònito
mista la sua non ha*

Temas pri la konata "Ei fu" de Manzoni (Manconi). Vi certe rimarkas, ke ne nur en la lernejo, kiam ni estis malgrandaj, sed ankoraŭ nun estas malfacile kompreni pri kio temas, kio estas "solio", kaj kiu vidis kiun, ĉu lin mia genio aŭ li mian genion?

Ĉu Szymborska/Marchesani estas pli grandaj poemistoj ol Manzoni? Ne ili estas malsamaj kaj pli modernaj, kaj ĉefe ili estas ekster la itala (sed ankaŭ franca) tradicio, kiu postulas, ke poemo ne estus en la normala lingvo, kiun la popolaĉo parolas. Por ke temu pri vera poemo la glavo estu "il brando" kaj ne "la spada", la sono estu "sònito" kaj ne "suono", kaj la koro estu almenaŭ "cor", ktp.

Italaj kaj francaj poemoj en Esperanto verkitaj laŭ tiu ideo, ke la poemo-verkisto parolas lingvon alian ol tiu, kiun parolas la popolo, abundas. Bonvolu ne imitu ilin. La forto de la poem-arto estas en la ideoj kaj en la maniero trafe kaj simple esprimi ilin. Ĉio cetera apartenas al la pasinteco kaj ne rajtas aparteni al Esperanto, lingvo farita por ke mongoloj komprenu japanojn kaj rusoj komprenu anglojn. Esperanto estas la lingvo de egaleco ankaŭ inter la simpla popolo kaj tiuj, kiuj verkas poemojn.